dis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn kaj dum
tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon
kaj plene prilabori ĝin praktike. Post
duonjaro post la festo de 5 —a de decem-
bro ni finis la gimnaziam kurson kaj di-
siris. La estontaj apostoloj de la lingvo
provis paroleti pri «nova lingvo» kaj,
renkontinte la mokojn de homoj matu-
raj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon,
kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur
mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi
antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5 1/2 jaroj
de mia estado en universitato, mi neniam
parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo
estis por mi tre malfacila. La kaŝeco tur-
mentis min; devigita zorgeme kaŝadi
miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ
nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj
la plej bela tempo de la vivo—la jaroj
de studento—pasis por mi plej malgaje.
Mi provis iafoje min distri en la societo,
sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj
foriradis, kaj de tempo al tempo faciliga-
dis mian koron per la versaĵo en la lin-
gvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi
versaĵoj («Mia penso») mi metis poste en
la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed
al la legantoj, kiuj ne sciis, ĉe kiaj cir-
konstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi
ekŝajnis, komprenebla, stranga kaj ne-
komprenebla.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigan-
te kaj provante la lingvon—kaj mi havis
sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro

«Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Komunigare so debá.»

En el Esperanto de ahora esto signi-
fica: «La enemistad de las naciones caiga,
caiga, ya es tiempo! Toda la humanidad
debe unirse en una familia.»

Sobre la mesa, además de la gramá-
tica y el diccionario, había algunas tra-
ducciones en la nueva lengua.

De este modo terminó el primer pe-
riodo de la lengua. Era yo entonces toda-
vía demasiado joven para salir al público
con mi trabajo, y decidí esperar aún
cinco ó seis años, y durante este tiempo
cuidadosamente ensayar la lengua y sobre
ella trabajar prácticamente. Dos años des-
pués de la fiesta del 5 de Diciembre
acabé el curso del gimnasio y me mar-
ché. Los futuros apóstoles de la lengua
probaron decir algo de la *nueva lengua*,
y encontrando las burlas de los hombres
maduros, se apresuraron á negarla, y
quedé completamente solo. Previendo
solamente burlas y persecuciones decidí
ocultar á todos mi trabajo. Durante los
cinco años y medio de mi estancia en la
universidad nunca hablé con nadie sobre
mi asunto. Este tiempo fué para mí muy
difícil. La ocultación me atormentaba;
obligado á tener cuidadosamente escon-
didos mis pensamientos y mis planes,
casi en ninguna parte permanecí mucho
tiempo, en nada tomaba parte, y el mejor
tiempo de la vida, los años de estudiante
pasaron para mí muy tristes. Intenté al-
guna vez distraerme en medio de la
sociedad, pero me sentía como extran-
jero, suspiraba y la abandonaba, y de
vez en cuando aliviaba mi corazón versi-
ficando en la lengua elaborada por mí.
Una de estas poesías («*Mia penso*») puse
después en la primera edición de mi
folleto; pero á los lectores que no sabían
en qué circunstancias estaba escrita esta
poesía, parecía, es natural, extraña é in-
comprensible.

Durante seis años trabajé, perfeccio-
nando y probando la lengua, y tuve
bastante que hacer, aun cuando en el

1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio «je», la elasta verbo «meti», la neŭtrala, sed difinita finiĝo «aŭ», k. t. p.—kredeble neniam enflus en mian kapon teorie; Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan «ion», la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan «*spiriton*».

(La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabra stilo—dume la esperantistoj pli spertaj skribas en la stilo bona kaj tute egala, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan *fundamentan* spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj).—Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi

año 1878 me pareció que la lengua ya estaba á punto. Traduje muchas cosas á mi lengua, escribí en ella trabajos originales, y reiteradas pruebas me demostraron que lo que me había parecido acabado en teoría no lo era en la práctica. Mucho tuve que cercenar, sustituir, corregir y transformar radicalmente palabras y formas, principios y consecuencias se empujaban y destruían mutuamente, mientras que en teoría y tras ligeras pruebas, me parecían inmejorables. Cosas como, por ejemplo, la preposición universal *je*, el elástico verbo *meti*, la neutral pero definida terminación *aŭ*, etcétera, es de creer que en teoría jamás me hubiesen ocurrido. Algunas formas que me parecían una riqueza, aparecieron después en la práctica un farrago inútil. Así, v. gr., tuve que desechár algunos sufijos inútiles. En el año 1878 me parecía que era bastante á la lengua tener gramática y diccionario; atribuía la pesadez y fealdad de la lengua solamente á que yo aun no la poseía suficientemente; la práctica pues de siempre, más y más me convencía de que la lengua necesita cierto *algo* imperceptible, que une los elementos, da á la lengua vida y *espíritu* definido, perfectamente formado.

(El desconocimiento del espíritu de la lengua es la causa de que algunos esperantistas, habiendo leído muy poco en Esperanto, escriben sin disparates, pero en pesado y desagradable estilo—mientras que los esperantistas expertos escriben en buen estilo, y siempre igual, cualquiera que sea la nación á que pertenecen. El espíritu de la lengua, sin duda con el tiempo, cambiará mucho, aunque poquito á poco y sin notarse; pero si los primeros esperantistas hombres de diferentes naciones no encontrasen en la lengua un espíritu *fundamental* perfectamente definido, cada uno comenzaría á tirar por un lado y la lengua permanecería para siempre, al menos por largo tiempo, como una colección de palabras faltas de gracia y de vida). Comencé entonces á evitar la traducción literal á esta ó á otra lengua, y trabajé directamente en pensar en el idioma neutral. Después

havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de ia influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: «via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akceptigi ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo». Sed ĉar la «mondo» ne estas ebla sen antaŭaj apartaj «unuoj», la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se nur transdonas al la adresato la ŝlosilon,—alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia «ŝlosilo», kiu enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formide apartaj, tute memstaraj kaj alfabeto orditaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreno vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro (Dro. Esperanto). «Lingvo internacia. Ataŭparolo kaj plena lernolibro» kaj komencis serĉi eldonanton, Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la

noté que la lengua en mis manos cesaba de ser una sombra infundada de otra lengua, con la cual tuviese yo algo que ver en este ó aquel momento, y recibía su propio espíritu, su propia vida, y su propia fisonomía, bien definida y expresada con claridad, independiente de toda influencia. La palabra fluía por sí misma, flexible, graciosa y totalmente libre, como cualquier lengua viva patria.

Otra nueva circunstancia me obligó por largo tiempo á diferir mi salida al público con la lengua. Durante mucho tiempo estubo sin resolver un problema que tenía gran significación para la lengua neutral. Yo sabía que todos habían de decir: «Vuestra lengua será útil para mí, cuando todo el mundo la acepte; por eso yo no puedo aceptarla hasta que todo el mundo la acepte.» Mas como el mundo no es posible, sin unos *primeros* anteriores aparte, la lengua neutral no podía tener existencia hasta que lograrse hacerse útil á toda persona, independientemente de que fuese ó no aceptada por el mundo. Largo tiempo discurri sobre este problema. Por fin, los tan renombrados alfabetos secretos, que no exigen que el mundo anteriormente los acepte y dan á la persona á quien os dirigís, completamente inexperta en ello, la facultad de entender cuanto le escribís con tal de comunicarle la clave, me llevó al pensamiento de colocar también la lengua á manera de una clave que, conteniendo no sólo todo el diccionario sino también toda la gramática en la forma de elementos separados, subsistentes por sí mismos y puestos por orden alfabético, daría á la persona á quien os dirigís, sin práctica alguna, de cualquier nación que fuese, la facilidad de comprender vuestra carta.

Concluí los estudios universitarios y dí principio á mi práctica de medicina. Entonces comencé á pensar en mi pública salida con mi trabajo. Preparé el manuscrito de mi primer folleto (Dr. Esperanto). «Lengua internacional. Prólogo y manual completo». Y comencé á buscar un editor. Mas aquí por primera vez encontré la amarga práctica de la vida, la

vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine—rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon kiu sin okupas je »flankaj aferoj»; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj.. mi transiris Rubikonon.

DRO. L. ZAMENHOF.

cuestión financiera, con la cual aun debía después y debo luchar fuertemente. Durante dos años busqué en vano un editor. Cuando ya encontré uno, empleó dos años en preparar mi folleto y al cabo rehusó. Por fin, después de largos trabajos, yo mismo me decidí á editar mi primer folleto en Julio de 1887. En vista de ello, yo estaba excitadísimo; comprendía que estaba de pie ante el Rubicón, y que en el día en que apareciese mi folleto, yo ya no podía volver atrás; sabía cuál es la suerte que espera á un médico que depende del público, si este público ve en él á un soñador, á un hombre que se ocupa de asuntos estrambóticos; comprendí que ponía sobre una carta mi futura tranquilidad, mi existencia y la de mi familia; pero yo no podía olvidar la idea que había penetrado en mi cuerpo y en mi sangre, y... pasé el Rubicón.

Hispanigis, R. P.—A. G.



Bibliografio


«*Kato kun botoj*». *Angla rakonto esperantigita de L. Milho. Prezo, 0F50. Aĉetebla ĉe la librejo Barbot-Ferruer, 71, rue de Halles, Tours (Franchando).*

Tin ĉi beleta broŝuro estas la n.^o 1 de la ilustrita Biblioteko por infanoj, eldonita de nia kara kolego *Espero Katolika*. Korekte tradukita kaj elegante manfarita, ni kredas ke tiu kolekto estas propagando potenco. Kaj ni ĝin varmege rekomendas, al niaj legantoj.

Bibliografía

«*Kato kun botoj*» (*Gato con botas*). *Cuento inglés traducido al Esperanto por L. Milho. Precio, 0f.50. Se vende en la librería Barbot-Ferruer, 72, rue de Halles, Tours (Francia).*

Este bonito folleto es el n.^o 1 de la Biblioteca ilustrada para niños, editada por nuestro querido colega *Espero Katolika*. Correctamente traducido y elegantemente manufacturado, creemos que esa colección será poderoso instrumento de propaganda, y con gran interés la recomendamos á nuestros lectores.



Popolaj kantetoj,

Nomataj «seguidillas». (Elparolu «segidijas»)

Je l' stelo kiu brillas
kun pli da brilo
mi juras vin amadi
dum mia vivo;
ĝi estos longa
laŭ viv' de bopatrino
la plej maldolĉa!

Se vi deziras lerni
ami, Mario,
devas vi min alpreni
kiel lernolibro.
Tiu ĉi koro
Donos al vi ekzemplojn
kaj lecionojn.

Foriras eksoldatoj
el urb' Murcia
Patrinoj multaj ploras...
kaj eĉ la mial;
ĉe la reveno
el la okuloj, kelkaj
sen vido estos!

De dimanĉo al dimanĉo
nur mi vin vidas
kiam venos dimanĉo
ĉarmo la mia!
ĝiam dum lundo
mi ĝemadas senĉese
de la profundo!

Se vin amadi kore
estos frenezo,
tute vin forgesadi
estus prudento,
mi tre deziras
esti ja frenezulo
ĉie kaj ĉiam.

Pro miaj kor' kaj amo
la plej konstantaj
mi petas: vi min amu
laŭ mi vin amas
kaj vi tuj vidus...
l' amantaj kolumbetoj
havos envion.

R. CODORNÍU.

Sciigoj

Anglujo.—Ni ricevis «The Esperantist», n.º 11 (Septembro). Inter aliaj belaj verkoj, raportas pri okazita kunveno de esperantistaj en Dovero pro la konkurso de aŭtomobilaj boatoj.

Belgujo (*Bruselo*).—Tie oni fondis novan grupon.

Francujo.—Laŭ «Lingvo Internacia» el Aŭgusto en

Beaune.—La kolegio estas unu el ses aŭ sep universitataj lernejoj. kie ekzistas oficiala instruado de esperanto. Naŭ ler-

Noticias

Inglaterra.—Hemos recibido «The Esperantist», núm. 11 (Septiembre). Entre otras bellas composiciones, se refiere á una reunión de esperantistas habida en Dover á causa del concurso de embarcaciones automóviles.

Bélgica (*Bruselas*).—Se ha fundado allí un nuevo grupo.

Francia.—Según «Lingvo Internacia», de Agosto, en

Beaune.—El colegio es una de las seis ó siete universidades donde existe enseñanza oficial de esperanto. Nueve estu-

nantoj el tiu ĉi kurso farata de Sro. Bord ricevis la diplomon de S. F. p. p. E. Tiu ĉi bona rezultato estis solene proklamita dum la disdono de premioj en la kolegio.

St. Etienne.—Oni faris kun sukceso, esperantista ekspozicio.

Chaumont.—Sro, Mossmann faris kurson de esperanto en la normala lernejo de junulinoj (estontat instruistinoj); dek-ses lernantinoj regule sekvis ĝin ĝis la fino.

Charenton.—Nova grupo tie fondiĝis.

La gazetoj «Le Cicerone», kaj «L'Eclairneur Normand» de ni ricevita, daŭrigas sian propagandon pri esperanto.

Ankaŭ ni ricevis la bonegan n.º 6 (Junio) de «Internacia Scienca Revuo».

Hispanujo.—La gazeto «Revista General de Marina» enpresas favoran kaj belegan artikolon pri esperanto verkita de la tre konata milita maristestro Sinjoro Gutierrez Sobral. La graveco de tiu publikado kaj de la nomita Sinjoro faras ke liaj protektoj estu honora kaj gravega akiro por la hispanaj esperantistoj.

Ni konsilas ĉiujn niajn abonintojn kiuj deziras havi kelkan ajn revuon, estu abonantoj al «Lingvo Internacia», kiu estas ankan organo de H. S. pp. E. Sekve oni trovos en ĝi specialajn sciigojn pri la divastigado de esperanto en Hispanujo.

Jare, 4 fr. Kun «Literatnra Eldono», 5 1/2 fr. Prova trimonata abono, 1fr.25.

27, Boulevard Arago.—Paris.

Manuel Benavente. — Sociedad, 14, Murcia.

diantes de este curso que hace el señor Bord recibieron el diploma de la Sociedad francesa para propagación del Esperanto. Este buen resultado fué solemnemente proclamado durante la distribución de premios en el colegio.

St. Etienne.—Se hizo con éxito una exposición de Esperanto.

Chaumont.—El Sr. Mossmann hizo un curso de Esperanto en la escuela normal de jóvenes (futuras maestras de instrucción); dieciséis discípulas lo siguieron con regularidad hasta el fin.

Charenton.—Un nuevo grupo se ha fundado allí.

Los periódicos «Le Cicerone» y «L'Eclairneur Normand», que hemos recibido, continúan su propaganda en favor del esperanto.

También hemos recibido el núm. 6 (Junio) de «Internacia Scienca Revuo».

España.—El periódico «Revista General» de Marina inserta favorable y hermoso artículo respecto al Esperanto, del muy conocido jefe de la Marina militar Sr. Gutiérrez Sobral. La importancia de esta publicación y la del nombrado señor hacen que su protección y la de aquélla sea honrosa y preciada conquista para los esperantistas españoles.

Aconsejamos á todos nuestros suscriptores que deseen tener alguna revista se suscriban á «Lingvo Internacia». Es también órgano de la Sociedad Española, y por consiguiente allí han de encontrar noticias especiales sobre la propagación del Esperanto en España.

Al año, 4 fr. Con «Literatura Eldono», 6 1/2 fr. Un trimestre para prueba, 1'25 fr.

27, Boulevard Arago.—Paris.

Manuel Benavente. — Sociedad, 14, Murcia.

Solvoj de la AMUZAJOJ el la 11.^a numero

De la VIV.—Kalo, Kelo, Kilo, Kolo, Kulo.

De la XV.—Nepino.

De la XVI.—Antaŭvido.

L. S. B.

Vi fajfos!

En vilaĝeto de Andaluzujo, la protektata de la suno, kie regas ĉiam spriteco kaj bonhumoro loĝis sinjoro Petro, komisiisto el tiuj kiuj veturas en la ĉefurbojn por akiri kaj alporti al malgrandaj vilaĝoj ĉiujn mendadojn, kiujn oni al ili antaŭe faris.

Sinjoro Petro estis bonulo multjara, ĉiam afabla kaj ridetanta, kaj tiel lerta ke laŭ konfeso de ĉiuj liaj amikoj, neniam oni trompis lin en la aferoj rilatantaj sian negocon.

Kiel agis li por triumfi ĉiam je siaj samlandanoj, malbonaj pagantoj?

Jen estas ekzemplo:

En kvinta vespero de Julia monato, Sinjoro Petro staris sur trotuaro apud pordo hejma, ricevante mendojn pri vojaĝo kiun li estis tuj faronta.

Amaso da infanoj alvenis al li ĉirkaŭis lin, kaj unue aore, poste unuope, diris: Ho, Sinjoro Petro! Alportu al mi fajfilon!

Sinjoro Petro ridetis, kaj afable diris al ĉiu... bone .. tre bone... perfekte... komprenita, k t. p, li karesis ĉiujn kaj nek akceptis nek rifuzis la petojn.

Kiam tumulto pasis, anĝelo kvinjara, modeste vestita, sed ekstreme pura, alproksimiĝis al Sinjoro Petro kaj balbutante diris: Ho Sinjoro Petro! multfoje mi mendis al vi fajfilon, kiun mia patro pagus al vi kaj vi, Sinjoro Petro, neniam ĝin alportis al mi; hodiaŭ mia patrino donacis al mi unu *hundineto* (1), prenu ĝin kaj alportu al mi la fajfilon.

Sinjoro Petro ekkaptis inter siaj brakoj la beletan infanon kaj kisinte lin, respondis:.. *vi fajfos!*..

A. J. L.

(1) Oni nomas «hundineto» monon, kies valoro estas kvin centimoj da pe-seto.

Tú pitarás

En un pueblecito de Andalucía, la protegida del sol, donde reina siempre la agudeza y el buen humor, vive el señor Pedro, comisionista de esos que viajan á las ciudades para adquirir y llevar á los pueblos pequeños los encargos que anticipadamente se les hacen.

El Sr. Pedro era un buen viejo, siempre afable y risueño, y tan listo que, según confesión de todos sus amigos, nunca fué engañado en los asuntos referentes á su negocio.

¿Cómo lo hacía él para triunfar siempre de sus paisanos malos pagadores?

Hé aquí un ejemplo:

En una tranquila tarde del mes de Julio, el Sr. Pedro estaba de pie en la acera cerca de la puerta de su casa, recibiendo encargos para un viaje que había de hacer en breve.

Un grupo de niños se acercó á él, le rodearon, y primero en coro, y luego uno á uno, dijeron: «¡Oh, Sr. Pedro! ¡Tráigame usted un pito!»

El Sr. Pedro se sonreía y afablemente decía á cada uno: Bien... muy bien... perfectamente... comprendido, etc.; y ni aceptaba ni rehusaba las peticiones.

Cuando el tumulto hubo pasado, un ángel de cinco años, modestamente vestido, pero extremadamente limpio, se aproximó al Sr. Pedro y balbuceando dijo: ¡Oh señor Pedro!, muchas veces le he encargado á usted un pito que mi padre hubiera pagado á usted, y usted, Sr. Pedro, nunca me lo ha traído; hoy mi madre me ha dado una *perrita*, tómelas usted y tráigame el pito.

El Sr. Pedro tomó en sus brazos al gentil niño y, besándolo, respondió... *tú pitarás.*

A. J. L.

Fraro.—En la paĝo 170.^a el nia 11.^a numero 4.^a linio diras *kiel mallonga vivi!* kaj oni devis diri *kiel mallonga viv!*

EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14

Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad, como igualmente de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

Diccionario Esperanto-Español de raíces, una peseta; Gramática, 0'75; cuadro de palabras correlativas, 0'10; enumeración y significado de los afijos, 0'25; ejercicio de traducción, 0'50. — **Revdo. P. ANTONIO GUINART** — ESCUELAS PIAS — VALENCIA.

L'Esperantiste oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societeton. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France.*

LONDONO Pensio por gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvoj. **Sinjorino O'CONNOR**, *Esperanto House, St-Stephen's Sq^r, Bayswater, 10.*

MANUAL Y EJERCICIOS DE LA LENGUA INTERNACIONAL
ESPERANTO, POR INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA. Precio: **3 pesetas.**
—En las principales librerías de España y América y en la administración de este periódico.

Legu en la Revuo „Lingvo Internacia“

La vivado en Port-Artur dum la milito ruso-japana
letero de tie-estanto.

*Raporton de esplora komisio de Liona Grupo Esperantista pri nunta stato de
Esperanto en la Mondo.*

Kaj diversajn artikolojn, rakontojn, k. t. p.

Jara abono: 4 Frankoj. Kun literaturo aldono: 6 1/2 fr.

Prova trimonata abono: 1 1/4 fr.

48 paĝoj

27, Boulevard Arago, Paris.